



PENSEO

N-ro 161

Marto/2005

Monata Beletra Revueto en Esperanto
Honorita de Premio Grabowski, 1994

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 16-a jaro <http://www.elperno.net/penseo.htm>

Sentitole

Adiaŭado al s-ro Dai Liming*, la kunbatalanto,
kiun mi neniam vidis



Lu Hai-er

mi ĵus aŭdis, lastajare en
Pekin'

ankaŭ partoprenis vi l' Kongreson
do, ni perdis ŝancon konatiĝi
via nom' konata freŝe al mi
jam dum nokt' falstele fulmis tra l' ĉiel'
fikse mi vin pririgardis,
nur svagaj' vualis okulparon mian

Jen sporade! sur la malfacila voj'
malmultiĝas homfiguroj jam nun
mi domaĝas, ke sublima via korp'
en malhela stelobril'
malaperis jen nerimarkebla...

tion, kion vere vi deĵetis, estas
torĉ', brulanta decideme
en flagranta stelolum'
torĉ' kaj torĉ'
matenruĝon prilumigas



elĉinigis **Elerno**

Dai Liming (1940-2005): famekonata kiel ĉina
Esperanta manio, sin donis al Esperanta afero
preskaŭ 40 jarojn, popularigante kaj
propagante senlace. Je la 6-a de marto, 2005,
li forpasis pro subita cerba hemorgio.

Kancero

Jin Guang

Timiga kancero! Wang Li finfine eksciigis
pri sia malsano: utera kancero. Ho ve! Kiam ŝi
troviĝis nur ĉe la sojlo de la aĝo de dudek
jaroj, ŝiaj idealo kaj estonteco deiris de ŝi iom
post iom malprosimen, dum la morto
alproksimiĝis al ŝi paŝon post paŝo. Kia sufero!
Ŝi falis en malesperon. Ŝi preferis forlasi plene
komforte ol resti turmentata de la malsano. Ŝi
do komencis akumuli dormigajn pilolojn...

Sufoke varmege. Post vespermanĝo, ŝi
eksentis senliman teruron. Elirinte el la
malsanulejo, ŝi paŝis sencele en la ĝardeno,
kaj poste eksidis sub arbeto, fikse rigardante
foren senrimede.

“Ĉu malsanulino en hospitalo aŭ vizitanto
al malsanulo?” aŭdiĝis voĉo. Reveninte de
distriĝo, ŝi trovis apud si starantan junulon,
kiu, kun dika libro aksele, estis atendanta ŝian
respondon.

“Ne, ho, mi enhospitaliĝas,” ŝi respondis
senorde.

“Mi nomiĝas Li Ming. Ankaŭ mi estas
enhospitaliĝanto. Ŝajne, ni estas samsortuloj.
De kia malsano vi suferas?”

“Kancero,” ŝi riedetis amare, sentante tion
amuza.

La demandinto, sen pluaj vortoj, eksidis kaj,
elpoŝiginte cigaredon malrapide, ekmeditis.

“Kian libron?” Ŝi ekprenis la libron kaj
komencis foliumi ĝin, sed nenio videbliĝis pro
la malhela vesperkrepusko.

“En la tuta libro troviĝas interesaj rakontoj.
Vi povas ekkoni ĝin per mia rakondado.” Li

Ming ekrakontis, “Estis juna soldato je la aĝo de 18 jaroj. Tuj kiam li rekrutiĝis, komenciĝis la memdefenda batalo kontraŭ Vjetnamio. En batalo, li perdis kontakton kun sia armeo. Kvankam liaj kruroj estis rompitaĵoj per kugloj de malamikoj, li ne fariĝis malespera. Nur kun granda persista volo, li sukcesis rampi sur la monta vojo pli ol 100 kilometrojn kaj reveni al la landlimo...”

Li rakontis serioze sed humure, dum ŝi aŭskultis gusteme. Ĝuste tiam li ĉesis abrupte.

“Kaj poste?” ŝi demandis.

“Pardonon. Mi legis ĝis ĉi tie. Se vi volas aŭskulti plu, mi daŭrigos legi alian parton antaŭ ol mi rakontos.”

De tiam, ĉiuvespere ili venis al la ĝardeno senaverte. Ŝi jen aŭskulti al la rakonto jen babilis kun li, tute foregesante sian malsanon. Kun alproksimiĝo al la finaj rakontoj de la libro, li ekhavis multe pli seriozan vizaĝesprimon ol antaŭe. Iutage, post ŝia nova korpa ekzamenado, la kuracisto konfirmis al ŝi, ke ŝi suferas de benigna tumorino anstataŭ utera kancero, kaj petis ŝin preta por morgaŭa operacio de fortranĉado.

Ŝi surprizigite rondigis siajn okulojn kaj poste komencis ridegi pro ĝojo, tiel ke ŝi forĵetis ĉiujn dormigajn pilolojn kaŝitajn sub la kapkuseno. Tiam ŝi ekpensis pri Li Ming.

Post vespermanĝo, ŝi iris multe pli frue al la malantaŭa ĝardeno de la hospitalo kaj eksidis sur la longa lata apogbenko, kiun ambaŭ ili bone konis, atendante lian alvenon. Tamen post longe li ne aperis. Ŝi do turnis sin al lia malsanĉambro, kiun li iam indikis. Kiam ŝi ĝoje puŝmalfermis la pordon, ŝi trovis lian liton vaka escepte de la libro kuŝanta apud la kapkuseno. Lia kunĉambrano diris al ŝi, ke Li Ming subite forpasis tagmeze pro malsukcesa savado de sia plimalboniĝa kancermalsano...



Ŝi ektemis. Ŝi sentis sian kapon rigida kaj vidis sennombrajn orstelojn antaŭ siaj okuloj, nesciante kion fari. Post

longe, ŝi sin eltiris el la duonkonscio. Ekpenso ŝajne fulmis tra ŝia menso. Kaj ŝi ekprenis la libron, kiun li ofte tenis en la mano. Sur la kovrilo estis presitaj kelkaj vortoj *Manlibro por Metallaboristoj...*

Ekkomprenante ĉion, ŝi nereteneble larmis.



elĉinigi **Vejo**

Shu Ting (1952 —)

Norden

rozo en somer’ komenca
tranĉas kord-similajn ondojn
velas horizonte al neatingebla for’
nigraj nuboj kiel musk’
plene kovras la vizaĝon de l’ ĉiel’
meva grup’ por
ŝi etendas pure blankajn flugilparojn

iru for
mia dezirata eta sun’
se vi falos
dormu en la sino de l’ mar’
kun meduz-arĝenta vualsupro supre
akompane de muĝado de verdaj ondoj

ankaŭ flosu mi tiele
glat-gladita de sunlum’ la vernto
blovu min leĝere
laŭ la varmaj marj fluoj
norden, norden

Muntoĉeno

en la montoĉen’ de tempo
nokton sekvas nokt’ kompakte
ni retiriĝas el la muntoĉeno de fabriko
kaj hejmiras en linioj muntoĉene
super nia kapo

kuŝas tra la ĉielvolb' la muntoĉen' de steloj
apud liniaro nia

etaj arboj stuporiĝas sur la muntoĉeno

certe steloj jam laciĝas
kelkmil jaroj jam forpasis
sed neniam ili ŝanĝas sian vojiradon
etaj arboj ĉiuj jam malsanas
fum' kaj monotono
jam senigis ilin je kolor' kaj svelto
ĉion mi jam sentas
pere de l' komuna takto

tamen strange
tio, kion mi ne povas senti
estas mia ekzistado
ŝajne la arboj kaj stelaro
eble pro kutimoj siaj
ne plu havas forton zorgi
pri la nuna situaci' fiksita

elĉinigi **Wang De**

Poemo

Bei Cun

poemo devas kaj legebli kaj ĉantebli
povas elbuŝiĝi kaj okupi l' koron
ĝi povas esti ensorbita de malsata tero
kun gusto dolĉa
ĝi devas dum legado
fariĝi melodi' de ĉanto
kaj dum ĉantad' ekflugi
ĝi devas havi plumojn
per mia kor' kaj ĝiaj plumoj
ĝi min sorigis je ajn tempo

poemo tagon pli briligas
pli malheligis nokton
kelktempe ĝi deprenas okulparon
per kiu eblas
mi vidi la ĉielon de natur' alia
konatojn miaj flugi tien kaj ĉi tien
sur kies vizaĝo naĝas ne suferoj
nur kredo firma

neĝblankaj vangesprimoj

poemo devas soni oreplacê je ekfrapo
ĝi igas longan vivon priskribebla
fariĝas la portreto poŝtsendebla
kaj prezentata antaŭ la altaro
ĝi soifigas homojn
la aŭreol' surkape de l' poeto
vertiĝaj igas homojn
post la rompado de figuro sankta lia
alnaĝas la vizaĝ' de Di' deposte
jen tio estas la tutvivo de l' poeto

elĉinigi **Ĉuto**

El Strangaĵoj de Liaozhai

DEFRAŬDOJ



I.

Foje, servisto de inspektoro hazarde staris en foiro, venis homo lukse vestita kaj alparolis kun li, kaj, iom post iom, demandis pri la nomo, rango de la mastro de la servisto, kaj tiu respondis senrezerve.

La lukse vestita homo konigis sin mem, dirante: "Mi havas familian nomon Wang kaj estas konfidenca sendito de la nobla princino."

Kaj ilia interbabilo iris pli kaj pli intime. Wang ekdemandis: "Danĝera estas kariero de ŝtatoficistoj. Tial mandarenoj ofte alpendigis sin al nobla parenco de imperiestro. Do, al kiu noblulo via mastro dependas?"

"Al neniu." respondis la servisto.

"Ho, tio ĝuste estas la ago avari pri malgranda spezo kaj forgesi pri granda danĝero," diris Wang.

"Sed al kiu dependi preferinde?" demandis la servisto.

"Mia mastro La Princino kondukis afable kaj emis protekti." diris Wang. "La vicministro N ja estis rekomende konigita de mi al ŝi. Se oni ne avarus pri mil taeloj da arĝento kiel donaco, peti aŭdiencon de la Princino ankoraŭ

